FN PER ANC 47

Normanda Esperanto Bulteno

Orgame de l'Union des Espérantistes de Normandie
- Nº 52 - 1959 - Decembro -

Redaktas G. MAMMAUX, 27 Rue Jules Ancel LE HAVRE-S.Mme

INTERNACIA LINGVO - INTERNACIA MOVADO

Ĉar nia lingvo estas internacia, la movado devas esti internacia ankaŭ. Tiucele ekzistas internaciaj organismoj (Universala Esperanto Asocio, S.A.T.Amikaro, Universala Ligo k.t.p.) kiuj materiigas l'internacian agadon. Estas necese ke ĉiu Esperantisto aliĝu al unu el tiuj societoj.

La loka grupo estas la unua ero de la ĉeno, la regiona unuiĝo "unuiĝas" la lokajn grupojn, la nacia Asocio estas la ŝtupo al la Internacia organismo. Tiuj diversaj grupoj bezonas vian helpon. Bedaŭrinde, se mono estas nervo por milito, porpacaj movadoj, kaj inter aliaj, la Esperanta Movado, ankaŭ bezonas monon. Tial, ni ne dubas ke vi faros vian eblecon por subteni tiujn diversajn asociojn, kies "oficistoj" estas sindonemaj samideanoj.

Ni ja scias ke la sumo de la diversaj kotizoj estas sufiĉe grava; ĉar kompreneble, vi havas eksterlandajn korespondantojn kaj la sendkostoj plialtiĝis; plue, eble vi deziras partopreni al nacia aŭ al internacia kongreso. En Majo 1960, vi, kompreneble partoprenos la Domfronta'n kongreson. Ni ne petas de vi pli ol vi povas, sed nur ĉion vi povas.

Dum la venonta jaro, ni daŭrigos nian laboron. "Ni semu, semu senĉese.."Ĉia peno, ĉia varbo ŝajnas, kelkfoje vana; tamen, p aŝo post paŝo, ni iras antaŭen- tro malrapide sed ni iras antaŭen ! Ĉu vi multfoje renkontas kontraŭlojn ? Ne ! Preskaŭ ĉiuj estas favoraj al Esperanto, eĉ se ili ne kuraĝas lerni la lingvon internacian. Demandu al miaj "pioniroj" ĉu estis same antaŭ kelkaj dekjaroj: ili renkontis nekomprenon kaj mokojn ! Vere, nia nuna tasko estas pli facila.

Ke ĉiam pli luma estu nia verda stelo, montranta la vojon al HOMARAMO, al PACO ! Estas nia plej kara deziro.

AGRABLAN KRISTNASKON !

FELIĈAN NOVJARON AL ĈIUJ !

Maurice H U E T
U.N.E. Prezidanto

KOTIZOJ POR I959

U.N.E. + Normanda Bulteno : 2 NF - CCP Rouen 283-40
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE, 63 Bld François Ier-LE HAVRE

U.E.F. -	Membre simple	8 NF
	Membre bienfaiteur	I5 NF
U.E.A. -	Membro jarlibro	8,25 NF
	Membro abonanto	I6,50 NF

Les cotisations pour UE.F. et U.E.A. sont à adresser:
UNION DES ESPERANTISTES FRANCAIS, 34 Rue de Chabrol -PARIS IOe
CCP PARIS 855-35

S.A.T. -	Membreco kaj Sennaciulo	8 NF
	Membreco + Sennaciulo + Sennacieca Revuo	IO,30 NF

Cotisation à adresser à : S.A.T. 67 Avenue Gambetta -PARIS 20e
CCP PARIS I234-22

G.E.E. -	Membre simple	8 NF
	Membre de soutien	IO NF
	Membre bienfaiteur	I2 NF

Cotisations à adresser à : S-ro G.DEBANDE, VALENCE D'AGEN (T & G)
CCP TOULOUSE I20I-59

UNIVERSALA LIGO
- Aktiva membro :Laùvole sed minimume 8,40 NF
+ donaco de unu aù pluraj brikoj- I briko estas 0,35 NF
- Abono al "LA PRAKTIKO": laùvole sed minimume 8,40 NF

Cotisations à adresser S-ro André LABIT
I20 Bis Rue Meurein LILLE - CCP LILLE I709-29

LE HAVRE : NI FUNEBRAS - Je la mezo de Septembro, ni estis informitaj pri la morto de F-ino Jeanne DUBOSQ, emerita instruistino kiu, dum jaroj, tutkore partoprenis kaj helpis nian movadon.

Nur pro malfortiĝo kaj familiaj zorgoj ŝi forlasis nin.

La I8-a de Septembro tri samideanoj ĉeestis la funebran ceremonion en la preĝejo StDenis en Sanvic.

V I R E
- Kurso de S-ro LEGRET por instruistoj
- Senlaca propagando de S-ro SAPEYRAS
- S-ro RIBOT parolis en lernejoj pri ESPERANTO

DOMFRONT - Grupo restariĝis : Prez. : S-ro VERON
Vic.Prez. : S-ro PERRET
Sekr. : F-ino DEVERRE
Kasisto : S-ro BAZOGE

EVREUX
- Ĉiusemajna kurso de F-ino MONTAGNE
- Urbestraro decidis nomi iun straton :Rue de l'Esperanto
- Evreux kuniĝis kun Germana urbo Russelheim.
La vicurbestro venis kun delegitoj... sed parolis Esperanto nur. F-ino MONTAGNE oportune kaptis la okazon por uzi nian universalan lingvon. Grava, oficiala sukceso por ESPERANTO.

R O U E N - La grupo kunvenis la I8an de Oktobro post longa somera dormado. S-ro QUILLAUD anoncis malfermon de unua grada kurso en lernejo Bellefonds, gvidata de li mem, kaj unua grada kurso en Ateliers SNCF Buddicum, en Sottevill gvidata de S-ro GUERRE.
Dank'al nia Prezidanto, S-ro JOUIS, mi havis la plezuron aŭdi magnetofonan sonbendon senditan de la grupo en Ipswich (Anglujo). Ĝi konsistis el individuaj alparoloj interrompitaj per ĥoraj kantoj. Nia grupo respondis per individuaj alparoloj registritaj sur la alia flanko de la sonbendo, kiu estis resendita al niaj britaj amikoj.
Okaze de la monata kunveno la I6an de Novembro, S-ro LOISEL prelegis kun lumbildoj pri sia partopreno al la Varsovia kongreso.

F E C A M P - Publikaj priparoladoj de Prez. PERMANNE pri lia vojaĝo al Varsovio.
- Grava ekspozicio en du magazenoj sur la ĉefa strato de Fécamp.
- Publika kurso.

C A E N - La 20 an de Decembro okazos propagand-priparoladon de F-ino CHERIE pri ZAMENHOF.

SAINT LAURENT DE BREVEDENT - VERDA VALO - Nur unu kurso por progresantoj : ĉiu 2-a kaj 4-a Sabato de la monato ekde Novembro ĝis Junio, je la I8-a kaj duono, ĉe Ges-oj LETENDRE.

NORMANDA MOVADO - Ampleksa propagando en Torisma-fako de S-ro BOSC.

K O N G R E S O

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Rappelons que le Groupe de DOMFRONT, tout récemment fondé, organise

LE 29-ème CONGRES NORMAND

Nous demandons à tous les Espérantistes de notre province d'adhérer immédiatement :

M. Gaston VERON, Place Petite Bruyère
DOMFRONT - (Orne) CCP ROUEN II88-63

en adressant son adhésion à l'adresse ci-dessus accompagnée du versement de la somme de 2,50 NF ou 250 francs anciens.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

P R O G R A M M E

Samedi I4 Mai I960

Théatre Municipal	20 h.30	Réunion publique d'information : causeries de IO minutes chacune. Sujets : Enseignement.Tourisme.Science. Chemins de fer. Les jeunes & l'Esperanto
	2I h.30	Election de la Reine I960 et de ses Demoiselles d'Honneur
	22 h.	GRAND BAL, avec le concours d'un orchestre réputé.

Dimanche I5 Mai I960

Théatre Municipal	9 h.30	Ouverture du Congrès L'ordre du jour sera publié dans le prochain bulletin.
	I2 H.	Réception de Monsieur le Maire, Président d'Honneur du Congrès.
	I2 h.30	Photo des congressistes.
	I3 h.	Déjeuner.
	I4 h.30	Visite de la Ville moyennageuse, site unique en Normandie.

COMITE D'ORGANISATION : Président : M. Gaston VERON
Vice-Président : M. Bernard PERRET
Secretaire : Mlle Denise DEVERRE
Trésorier : M.Bernard BAZOGE

Hôtels de toutes classes - Terrain de Camping

Demandez le Guide Touristique (avec texte en Esperanto)

I N F A N A Ĵ O J (N° 4)

Broŝuroj verkitaj kaj ilustritaj de la Infanoj

- Eldonejo de la moderna franca lernejo CANNES (A.M.)

-:-:-:-:-

HISTORIO DE LA KNABETO SUR LA MONTO (Sekvo)

EN LA ARBARETOJ

Justin estis unu tutan tagon en la arbaretoj.

Li iris kun Elisa por kolekti mortintajn foliojn; la pintfolietojn falintajn de la aŭtuno, kaj kiuj faras grandajn amasojn sub la arboj.

Por Justin estis bona tago.

Nun li konas la arbaron kaj li ŝatas ĝin.

Kelkloke, la arboj estas densaj kaj premitaj. Tie, ĉe iliaj piedoj, oni trovas multajn mortintajn foliojn miksitajn kun pinifruktoj kaj sekaj branĉoj. En aliaj lokoj, la arboj estas disaj, la herbo kreskas longa kaj ornamita per miozotoj kaj kampanuloj.

Kelkfoje oni aŭdas freŝan fonteton, kiu sole kantas en la arbaretoj. Estas ankaŭ grandaj kampoj de vakcinioj. Estas tiom da vakcinioj, ke oni neniam povus ilin ĉiujn kolekti, eĉ se oni restus en la arbaretoj ĝis la nokto.

LA ĈASO AL LA MARMOTOJ

Leon kaj Gilbert, kiuj estas grandaj, diras al Justin :

-Venu kun ni, ni iras por ĉasi la marmotojn ... Ĉiuj tri jam foriras; Marmotte kaj Fidele, la hundoj, akompanas ilin.

Jen truoj sub la herbo, estas la marmotaj domoj. La hundoj flaras kaj gratas la teron bojante. Gilbert kaj Leon esploras ĉe alia flanko per bastono.

Tro malfrue ! La marmotoj ne plu estas tie. Niaj amikoj aŭdas ilin fajfi ĉi-supre, sur la rokoj. Ili revenas neniontrafinte.

LA MANĜO EN LA LIGNODOMO

Al l'Oriol Justin manĝegas.

Li ĉiam malsatas; kajĉio bongustas ĉi-tie, multe pli bone ol en Ste Marguerite. La terpomoj rostitaj en bolpoteto estas bongustaj; la lakto, la fromaĝo, la butero kaj la supo ankaŭ tre bongustas.

Je la manĝotempo, oni ne sidas ĉetable. Ĉiu prenas sian pelveton kaj iras manĝi kie li volas. Oni sidiĝas ie ajn sur skabelon aŭ sur lignan ŝtipon antaŭ la pordo.

Justin iras ĉiam sidiĝi sur dikan ŝtonon ekstere. Li manĝas li vidas la monton; kiu envolviĝas en nebulo, vespere. Kaj kelkfoje li ree envenas por plenigi sian pelveton...

(Tradukis el la franca : S-ino VINVENT, Av. de Gaulle, LES ANDELYS)



" Si vous voulez que je vous emmène à **DOMFRONT**, vous avez juste le temps d'apprendre l'**ESPERANTO** ".

-:-:-:-:-:-:-:-

L A V I E D E L'E S P E R A N T O

De tout : : : : : : um peu : : :

LE PERE DE L'ESPERANTO DONNE SON NOM A UN NAVIRE (les journaux)

De Varsovie, nous apprenons que le premier navire au nom de ZAMENHOF, créateur de la langue internationale Esperanto a été lancé à Split en Yougoslavie. Celui ci est construit pour le compte de la Cie Polonaise Océanique avec comme port d'attache Gdynia. Il est principalement destiné aux voyages à longue distance vers la chine.

Le nouveau cargo mesure I54 métres de longueur, il a une largeur de I8,80m. et une hauteur de I2 m. Il possède un moteur Fiat de 6.000 chevaux. C'est un navire de I2.800 tonneaux qui peut naviguer en pleine charge à la vitesse de I5 miles à l'heure. Ce navire est le deuxième d'une série de sept construits pour la Pologne par les Chantiers Yougoslaves"Split". Le prochain cargo qui sera lancé sera le "Chopin".

-:-:-:-:-:-:-:-

A VIENNE ON PEUT SE CONFESSER EN ESPERANTO (les journaux)

Dans le Diocèse de Vienne, les catholiques peuvent se confesser en 25 langues étrangères. La liste des Pères confesseurs commence par celui qui parle Arménien. Il y en a un qui parle le Bulgare et deux le Danois. Les touristes anglais et français sont eux les mieux lotis quant au nombre de confesseurs dont ils disposent si, étant catholiques ils veulent faire l'aveu de leurs péchés à un prêtre. En plus de quelques autres langues il y a également un confesseur qui entend la langue internationale Esperanto.

-:-:-:-:-:-:-:-



" Et si vous ne comprenez pas le français, mon fiancé peut vous le répéter en **ESPERANTO** ".